tejo

# REALIGPLANO

2023-2024

# Enhavtabelo

**Enhavtabelo** **2**
**Enkonduko** **3**
**Aktivularo de TEJO** **4**
La Estraro 4
Volontuloj 4
Oficistoj 4
Redaktoroj kaj Komisiitoj 4
**Sekcio 1: Administrado** **5**
Ĝenerala funkciado 5
Financoj kaj Subvencioj 7
**Sekcio 2: Programa laboro** **8**
Aktivula Trejnado (AT) 8
Projektoj 10
Edukado, Scienco, Kulturo (ESK) 12
Eksteraj Rilatoj (KER) 13
Informado (kaj Kontakto) 14
Landa kaj Faka Agado (LFA) 15

# Enkonduko

Nome de la estraro de TEJO, mi ĝojas prezenti al vi la realigplanon por 2023-2024. La ĉi-jara mandato estas la unua post kelkjara periodo de financa krizo. Konsidere ke mia originala aliĝo al la estraron koincidis kun la nericevo de la administra subvencio, mi ĝojas ke finfine dum mia tria mandato en la estraro, ni nun povas agadi ekster tiaj kondiĉoj.

La kernaj celoj de la estrara jaro 2023-2024 konsistas el la jenaj:

**Plibonigi kaj profesiigi nian internan administradon**. Malgraŭ la fakto ke ni signife pligrandiĝis dum pasintaj jaroj (kompare al antaŭ 10 jaroj, ni havas 5-oble pli granda buĝeto kaj de 1 plentempaj laborantoj al 7) niaj labormetodoj ne sufiĉe ŝanĝiĝis. Ni ne sufiĉe bone regas la proprajn financojn, kaj la fakto ke volontula estrarano devas mem trakti ĉiujn pagojn estas forte evitinda, kaj fremda koncepto kompare al similaj internaciaj junularaj organizoj. Nun ke ni denove havas monrimedojn, ni volas ŝanĝi tion.

**Enradikigi retajn eventojn kiel kerna parto de la laboro de TEJO**. Dank' al la pandemio TEJO komencis fari retajn eventojn pli ol iam ajn antaŭe, sed ili ne ankoraŭ havas stabilan ekziston. Ĉi-jare ni planas okazigi Retoson dufoje, kaj ambaŭ tute memstare sen la subteno de aliaj organizoj. Dum antaŭa epoko oni ofte parolas pri la 'sankta triunuo' de la servoj kiujn TEJO provizas (IJK, Kontakto, kaj Pasporta Servo) kaj ni vere esperas ke ni nun povos firme aldoni Retoson al tiu listo.

**Plibonigi kaj plibuntigi nian laboron rilate al projektoj**. TEJO faris multege en tiu sfero dum la pasintaj jaroj - kun ĉiujare pli da subvenciitoj kaj pli buntaj projektoj - kaj ni volas konstrui pli sur tiu forta bazo. Ekzemple, se ĉiuj subvencipetoj estas akceptitaj, estos pli ol 200+ senpagaj lokoj por Esperantaj eventoj dum la nuna mandato. Aldone, la projektoj ne plu estas nur trejnadoj sed ankaŭ pli kulturaj aferoj - kiel la ĝisnunaj Muzikaloj bele montras. Tiuj projektoj ankaŭ ligas al ĉiuj partoj de la laboro de TEJO, kun pli da bonaj enhavoj por informado, pli da ĉeestantoj por kongresoj, kaj ankaŭ subtenas eventojn kiel Retoso.

La strukturo de ĉi tiu dokumento sekvas la taskodividon de estrara laboro. La unua sekcio temas pri la administrado de TEJO (Ĝenerala Funkciado, kaj Financoj kaj Subvencioj), kiu kerne gravas por bone plufunkciigi la organizon tagon post tago. La dua sekcio temas pri nia 'Programa laboro' - tiuj partoj de nia agado kiuj plej videblas de ekstere, kaj plej gravas por engaĝi la komunumon kaj antaŭeniri Esperanton.

Bonan legadon, kaj ni kalkulas je via kunlaboro por kune "realigi" la realigplanon.

**Tyron Surmon**
Prezidanto de TEJO 2023-2024
nome de la TEJO-Estraro

# Aktivularo de TEJO

**La Estraro**

Tyron Surmon, prezidanto
Snehaĝa Venkatesh, unua vicprezidanto
KuboF Hromoslav (Michal Matúšov), ĝenerala sekretario
Patricio Agustín Iglesias, kasisto
Abhinav Varma, estrarano
Ada Florence Iracadukunda, estrarano

**Volontuloj**

Cyril Schultz (2023-2024)
Maria Tsagari (2023-2024)
Salvatore Iozzo (2023-2024)
Guaroa Emmanuel "Manu" González Cuevas (2022-2023)
Jonas Leonard Shanahan Löser (2022-2023)

**Oficistoj**

Jeanne Grimaud, Komunikisto kaj Kunordiganto de Volontuloj
Carlos Pesquera Alonso, Subvencipetisto
David Ruíz Sánchez, Eksterrilatisto
Mia Nordentoft, AKSO-Oficisto
Vincent, AKSO-Oficisto

**Redaktoroj kaj Komisiitoj**

Gobi Abyssinie Ahonon, LFA
Aime-Patrick Manirakiza, LFA
Arya Bhaskara Ferduzi, LFA
John Emmanuel Magessa, ESK
Lucca Catini Lanzi, LFA
John Magessa, LFA
Mateus de Sena LFA
Karina Gonçalves de Souza de Oliveira, Redaktoro de Revuo Kontakto
Joshua Moss, AA
Oliver Fox-Rubin, LFA
Wojciech Oreszcuk, ESK
Ana Ribeiro, KER
Hans Becklin, KER
Konstanze Schönfeld, KER
Michael Vrazitulis, KER
Ikvero Almeida, Redaktoro de Movada Rubriko

# Sekcio 1: Administrado

## Ĝenerala funkciado

**Priskribo:** La TEJO-Stabo konsistas el ĉiuj elektitaj estraranoj, salajrataj oficistoj kaj volontuloj en la Centra Oficejo en Roterdamo. La stabo kolektive certigas la glatan ĉiutagan agadon de TEJO, por ke ĝi plenumu siajn plej bazajn celojn kaj devojn al siaj membroj kaj kunlaborantoj. La Estraro realigas la decidojn kaj rekomendojn de la Komitato. La prezidanto kaj la ĝenerala sekretario, inter ĉiuj estraranoj, kune prizorgas la internan kaj administran evoluon de la organizo. Tiu ĉi paĝo kovras ĉiujn "administrajn" laborojn, kaj ankaŭ aliaj agadoj kiuj gravas sed ne meritas propran paĝon.

**Respondecaj aktivuloj**: Tyron (prezidanto), KuboF (ĝenerala sekretario), Jeanne (kunordiganto de volontuloj)

**Antaŭviditaj rezultoj**:

| Planita agado | Komentoj |
|---|---|
| Konkludi AKSOn | TEJO eniris kontrakton kun UEA en 2019, por liveri novan administran sistemon por ambaŭ organizoj. Survoje estis multaj malfacilaĵoj, sed realigeblas ene de monatoj fintrakti tiun kontrakton kaj ricevi la finan pagon. Tiam ni kaj UEA kune decidos pri la posta engaĝiĝo de TEJO en la projekto |
| Varbo de novaj estraranoj por la Estraro de TEJO | La nuna Estraro estas nur 6-kapa. Tio ne daŭripovas, kaj signifas ke kelkaj fakoj ne ricevas sufiĉan atenton. Ni planas mezmandate varbi novajn estraranojn, kun la espero ke kompare al la komenco de la mandato, pli facilos varbi homojn kiam la teamo jam ekzistas kaj la specifaj bezonoj estas klaraj |
| Decidi pri nia dungostrategio por 2024 | Nia ĉefa EU-subvencio donas 100 mil EUR por 3 plentempaj ekvivalentaj dungitoj, kaj 125 mil EUR por 5 plentempaj ekvivalentaj dungitoj. Ĝuste nun, TEJO superas 4 plentempajn dungitojn, kaj ni devas decidi kiun vojon ni volas sekvi, ĉar ambaŭ havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn |
| (Eventuale) dungi ĝeneralan direktoron de TEJO | Lige al la supra punkto, ni esperas iam ĉi-mandate konkrete progresi la longdaŭran ideon, dungi specifan ĝeneralan direktoron de TEJO, por malpezigi la administran laboron kiun la Estraro devas fari, kaj eviti la abruptajn ŝanĝojn en la laboro kiuj ofte okazas pro la ŝanĝo inter Estraroj |
| Trovi kandidaton por IJK 2025 | Ekde la pandemio estas malfacila trovi kandidatojn por organizi la IJKn. Eble malkiel antaŭe, TEJO devas aktive serĉi, kaj ne povas simple atendi kaj esperi ke taŭga kandidato venos. Aldone ni vere ŝatus sukcese organizi la IJKn denove ekster Eŭropo, kaj konscias ke tiu kandidoto certe bezonus multe da subteno |

| | |
|---|---|
| Organizi Retoson dufoje | Kvankam Retoso gravas por TEJO, ĝi ne ankoraŭ havas stabilan ekziston, kun neklareco pri kiu, kiel, kaj kiam organizi ĝin. Ĉi-mandate ni planas okazigi la eventon dufoje kaj tute memstare, por espereble inaŭguri tradicion kiun estontaj estraroj povos sekvi |
| Plifortigo de Pasporta Servo | TEJO iom neglektis Pasportan Servon dum la pasintaj jaroj (dependiĝante de la elstara laboro de unuopaj aktivuloj) kaj ni volas ŝanĝi tion. Ni planas renovigi la mesaĝilon, restarigi la reton de landaj organizantoj, poluri la datumbazon de gastigantoj kaj trovi novajn kunlaborantojn en landoj kie nia reprezentado estas febla aŭ nula |
| Relanĉo de Junaj Amikoj de Esperanto | Varbado de novaj junaj amikoj, komunikado kun jam ekzistantaj anoj de tiu kategorio, instigado al TEJO-aliĝo kiel individuaj membroj kaj okazigo de balotado por komitatano Ĉ |
| Ĝisdatigo de nia datumprotektpolitiko | En konsultiĝo kun spertuloj ni daŭre analizos kaj ĝisdatigos nian datumprotektpolitiko konsiderante la evoluon de la norma kadro kaj la informteĥnologioj |
| Varbado de novaj patronoj | Dialoge kun UEA kaj ĝiaj landaj kaj fakaj asocioj ni kreskigos la kvanton de patronoj, instigante ilin ne nur subteni TEJOn per kotizoj kaj donacoj sed ankaŭ rekte partoprenante en la ĉiutaga agado de la organizo |
| Elekto de konfidencpersonoj kaj plisekurigo de eventoj | La IJK 2023 montris ke TEJO ne ankoraŭ sufiĉe bone havas procezon por kiel trakti kazojn de ĝenado, kaj ĝenerale kiel estonte certigi la sekurecon de niaj eventoj. Por solvi tion, ni ekos la procezon elekti nova(j)n konfidencpersono(j)n kiuj helpos (kune kun aliaj aktivuloj kaj la estraro) prenos decidojn cele al la preventado kaj punado de ĝenado en la junulara medio |
| Plibonigo de organiza dokumentado kaj labormanieroj | Adapto kaj ĝisdatigo de la granda manlibro kaj aliaj manlibroj, kaj esploro pri sistema ekuzo de projekta mastrumilo, Laŭebla anstataŭigo de uzataj programoj per tiuj kun Esperanta interfaco |
| Plivigligo de adoleska agado | Ni daŭrigos la kontaktadon de adoleskaj esperantistoj, plifortigante spacojn por ke ili amikece kaj sekure renkontiĝu kun samaĝanoj dum ni oferos al ili eblecojn por ke ili disvolvu sian kreemon |
| Esplorado pri ANBI | Stabanoj de TEJO esploros pri kiel sukcese akiri ANBI-statuson (*Algemeen nut beogende instelling* - nederlanda procezo por registriĝi kiel bonfara organizo) |

## Financoj kaj Subvencioj

**Priskribo:** Venante de la 2022-2023 mandato, komplika kaj defia pro la ekonomiaj malfacilaĵoj kaŭzitaj de la nericevo de la EU-administra subvencio, kiu kovras la plej grandan parton de niaj elspezoj, ni sukcesis plibonigi la situacion. Dum ĉi tiu mandato 2023-2024 ni sekvas la agadvojon de la lasta periodo. Ni restos kun efikeco en la ĝusta administrado de niaj financoj, kreante monrezervon kaj saĝe uzante niajn rimedojn por realigi la Strategian Planon 2021-2025. Ni konservos la Financan Komisionon kiel konsilan spacon por la estraro, precipe por la Kasisto, dum ni plifortigos la dialogon kun niaj sekcioj kaj kun aliaj organizoj.

**Respondecaj aktivuloj:** Patricio (kasisto), Karlos (subvencipetisto), Tyron (prezidanto)

**Antaŭviditaj rezultoj:**

- Efektivigo de efika kaj ŝparema administra plano
- Sukcesigo de la peto de la administraj subvencioj de EU kaj KdE en 2024 kaj esplorado pri aliaj subvencikadroj
- Diversigo de la enspezfontoj de la organizo, antaŭenpuŝante interalie donacojn kaj membrokotizojn, por eviti grandan dependecon de eŭropaj subvencioj
- Pliprofesiigo de la financaj respondeculoj de landaj kaj fakaj sekcioj.

| Planita agado | Komentoj |
|---|---|
| Regula financa raportado | Oni pli regule, simple kaj profesie informos la stabon kaj la Komitaton pri la stato kaj evoluo de la financoj de TEJO |
| Rekreskigo de la organizaj rezervoj | Per sufiĉe granda surpluso ni povus ekz. subteni ekstereŭropan IJKn kaj agadon en evolulandoj sen bezono de subvencio |
| Kandidatiĝo por la administrajn subvenciojn de EU kaj KdE kaj por eŭropaj projektoj | Kunordige kun la oficistoj kiuj respondecas pri subvencipetado ni profitos de ĉiuj eblecoj ene de la eŭropa kadro (projektoj de Erasmus+, KdE, la Eŭropa Komisiono kaj la Eŭropa Parlamento). Plej nova por la venonta jaro estos la administra subvencio de KdE, kiun ni nun rajtas alkandidatiĝi. Se ni sukcesas, ni akiros nelimigitan 50 mil EUR dum 2 jaroj |
| Dungostrategio por la jaro (same kiel supra paĝo) | Oni pridiskutos la dungostrategion por la jaro 2024 per longdaŭra perspektivo por ontaj jaroj, konsiderante la leĝaj markoj, respektante la rajtojn de laboristoj kaj gardante la financan daŭripovecon de la organizo |
| Pliprofesiigo de kasistoj kaj financaj respondeculoj de landaj kaj fakaj sekcioj | Per specifaj iniciatoj kaj favorigante la neformalan kontakton inter financaj respondeculoj oni atingos la riĉigon de la financa agado de niaj sekcioj, prenante taŭgajn sugestojn kaj ideojn ankaŭ por TEJO. |
| Dialogo kun aliaj organizoj | Oni daŭre riĉigos la financrilatan laboron per dialogo en la Financa Komisiono de UEA kaj eventuale ankaŭ kun aliaj organizoj |
| Esploro pri uzadoj de ĉifroekonomiaj iloj | Kunlabore kun UEA kaj niaj sekcioj oni esploros pri la eblecoj kaj avantaĝoj de novaj financaj teĥnologioj, taksante interalie la akceptadon de pagoj en ĉifrovalutoj aŭ la organizadon de donackampanjoj per ¿neanstataŭeblaj ĵetonoj?, eventuale adoptante tian ilon. |

# Sekcio 2: Programa laboro

## Aktivula Trejnado (AT)

**Priskribo:** TEJO zorgas pri plikapabligado de aktivuloj kaj membroj de TEJO kaj ĝiaj sekcioj, kaj de junaj esperantistoj ĝenerale. Kutima maniero, kiun ni por tio uzas, estas teĥnikojn de neformala edukado, ekzemple trejnadoj. Ni zorgas, ke la edukaj materialoj, kiujn ni kreas, estu laŭeble disponeblaj por esperantistoj tutmonde, tiel plivastigante efikon de trejnadoj vaste preter la loko, kie ili okazis, kaj emfazante tutmondecon de TEJO. Ni jam tradicie kunlaboras kun internaciaj organizoj, notinde Eŭropa JunularFonduso (EJF) de Konsilio de Eŭropo (KdE), por organizi trejnadojn pri temoj rilataj al Homaj Rajtoj kaj Demokratio.

**Respondecaj aktivuloj**: KuboF (respondeca estrarano), David (subvencipetisto), Karlos (subvencipetisto)

**Antaŭviditaj rezultoj**:
- pluteno kaj pliaktivigo de TEJO-Trejnistaro
- plikapabligo de junaj esperantistoj pri diveraj temoj rilataj al homaj rajtoj kaj demokratio, pri aktiva partopreno en socia kaj kultura vivoj, kaj plibonigo de iliaj teĥnikaj kapabloj
- pliefikigo kaj pliprofesiigo de TEJO-Akademio kaj agado por Aktivula Trejnado

| Planita agado | Komentoj |
|---|---|
| Okazigo de TEJO-Trejnistaj Renkontiĝoj (TTR-j) | Ĉeestaj kaj eventuale virtualaj renkontiĝoj de TEJO-trejnistoj por ĝisdatigo pri Aktivula trejnado, planado de laboro kaj plifortigado de teama kaj amika sento. Dum IJK 2024 kaj iam dum jaro. |
| Varbado de trejnistoj por aliĝi al TEJO-Trejnistaro | Varbado de novaj trejnistoj tra la jaro. |
| Studsesio: Junularaj Perspektivoj | Kunlabore kun la Eŭropa Junulara Centro (EJC) de Budapeŝto, oni okazigos studsesion pri interkulturaj dialogoj kaj neperforta komunikado, estos tri trejnistoj kunlabore kun KdE-trejnisto kaj TEJO-eksterrilatisto. |
| Studsesio: pri interkultura inklusiveco | Kunlabore kun la EJC de Budapeŝto aŭ Strasburgo, kaj je la atendo pri konfirmo, oni okazigos studsesion pri interkultura inklusiveco, estos tri trejnistoj kunlabore kun KdE-trejnisto kaj TEJO-eksterrilatisto. |
| Serio da seminarioj pri packonstruado | Proponita serio de 4 seminarioj kun 3 trejnistoj. Intencata subvencio de Eŭropa Junulara Fonduso (EJF) de KdE. |
| Podkastoj | Projekto por disvolvi kapablojn pri kreado kaj disvolvado de de podkastoj. Inkluzivante du trejnadoj, unu dum IJK kaj alia dum JES. Propono por subvencio de Erasmus+. |
| Pliefikigo de la rilato kun la | La rilato inter AT kaj Talento dume estas nespecifa kaj ambigua. Ni diskutos |

| | |
|---|---|
| komisiono pri Talento | pri ebloj por plibonigo kaj implementos la decidojn. |
| Ĝisdatigo kaj plibonigoj por listigo de TEJO-trejnistoj | Adapto por facila uzado de la listigo ankaŭ per poŝtelefonoj kaj kun ebleco por kopii tekston pri trejnistoj. Konsidero de pli progresa maniero de listigado de trejnistoj. |
| Rekonsidero de teĥnika flanko de kursoj de TEJO-Akademio | De la teĥnika vidpunkto, kursoj en la TEJO-Akademio nuntempe funkcias. Ni tamen konsideros kiel plibonigi la teĥnikan flankon por pli taŭga lernado. |

# Projektoj

**Priskribo**: Krom laboro financata grandparte de TEJO mem aŭ de struktura subteno (kiuj estas notitaj en aliaj partoj de la Realigplano), ni realigas ankaŭ grandajn projektojn subvenciatajn de eksteraj fontoj, notinde de Erasmus+ de la Eŭropa komisiono. Per tiuj ni kutime celas krei kulturajn enhavaĵojn en Esperanto, kaj diversajn agadojn por plibonigi la socion. Historie tiuj subvencioj grandparte venas de Eŭropo por Eŭropaj esperantistoj, kio ne estas kongrua kun nia tutmondeco. Ni celas plivastigi oportunojn ankaŭ por junaj esperantistoj de ekster Eŭropo, por kio la sekva paŝo estos esploro de tiaj oportunoj.

**Respondecaj aktivuloj**: KuboF (respondeca estrarano), Karlos (subvencipetisto), David (subvencipetisto)

**Antaŭviditaj rezultoj**:
- kreitaj pluraj kulturaĵoj en Esperanto
- plifortigo de sentoj de amikeco kaj internacieco inter partoprenontoj de projektoj
- memoraĵoj por tuta vivo por partoprenontoj de projektoj
- pli granda klareco por longtempa planado
- plitutmondigo de agado de TEJO

| Planita agado | Komentoj |
|---|---|
| Esperanto senlime 2 | Vojaĝa konkurso de Berlino ĝis Vilno. Daŭrigo de Esperanto Senlime. Propono por subvencio de Erasmus+. |
| Teatro | Kreado de teatraĵo (simile kiel pasintaj projektoj pri muzikaloj). Propono por subvencio de Erasmus+. |
| Manĝaĵoj IJF | Kuniga interkultura aktivaĵo per manĝa kulturo. Propono por subvencio de Erasmus+. |
| Manĝaĵoj IJK | Kuniga interkultura aktivaĵo per manĝa kulturo. Propono por subvencio de Erasmus+. |
| Mezlernejoj | Moviĝeblo por mezlernejanoj. Propono por subvencio de Erasmus+. |
| Seminario pri rifuĝintoj | Propono por subvencio de Erasmus+. |
| Longtempa plano por sinsekvaj projektoj | Baza tema limio por projektoj pli foren en estontecon. Tiel ni povos pli konscie plani sinsekvojn de ili. |
| Esploro pri subvenciataj projektoj ekster Eŭropo | Ĝis nun, por siaj subvenciataj projektoj TEJO multe dependas specife de Eŭropaj instancoj. Tio unuflanke provizas bonegajn eblojn, aliflanke limigas partoprenon de junaj esperantistoj de plejparto de Tero. Ni volas plivastigi tiujn oportunojn ankaŭ por ekster-Eŭropanoj. En tiu ĉi mandato estas planata nur esploro (kiel unua paŝo), sed ne peto de subvencio de ekster Eŭropo. |
| Seminario Partoprenu! | Finigo de la projekto de antaŭa mandato. |

| | |
|---|---|
| Esperanto senlime | Finigo de la projekto de antaŭa mandato. |
| Muzikalo 2 | Finigo de la projekto de antaŭa mandato. |

## Edukado, Scienco, Kulturo (ESK)

**Priskribo:** Edukado celas la plibonigadon de Esperanto-instruado, kaj la uzadon kaj rekonon de Esperanto en edukaj institucioj, praktikoj kaj materialoj. Scienco celas la pliriĉigon de sciencaj artikoloj kaj agadoj per kaj por Esperanto. Ĝi ebligas al junuloj kun sperto pri scienca kaj fakecaj kapabloj kunveni kaj agadi por esplori kaj pliriĉigi siajn studojn aŭ profesiojn per Esperanto. La branĉo pri kulturo estas forumo, kiu celas kompreni, plifortigi kaj kreskigi la kreemecajn esprimeblecojn de siaj membroj, de la junularo esperantilingveca, kaj de nia movado ĝenerale. Ĉiuj brancoj kerne kontribuas al la agado de TEJO dum eventoj kiel Retoso, kaj kvankam Kulturo nun estas sen specifa komisiisto aŭ estrara gvidanto, la aliaj du brancoj aktivas kaj viglas

**Respondecaj aktivuloj**: Snehaĝa (respondeca estrarano), Òscar (komisiito pri scienco), Espoir Ngoma Kasati (komisiito pri Edukado)

**Antaŭviditaj rezultoj**:

#### Komisiono pri Edukado

| Planita agado | Komentoj |
|---|---|
| Regule okazigi la *instruistan kafpaŭzon* | Instigi junajn esperantistajn instruistojn aliĝi al la komisiono por estis regule informitaj pri ajnaj iniciatoj pri Edukado kaj interŝanĝi pri edukadrilataj aferoj |
| Organizi virtualan seminarion | Organizi instru-seminario virtuala por junaj instruistoj el ĉiuj kluboj pri metodologio instrui Esperanton. Inviti ILEI-spertulon por tio. |

#### Komisiono pri Scienco

| Planita agado | Komentoj |
|---|---|
| Esperanta versio pri ISKŜ | Fini tradukadon de la ISKŜ raporto, kaj reklami ĝin |
| Sciencaj prelegoj | Organizi sciencaj prelegojn kaj konkursojn dum eventoj de TEJO kaj ĝiaj landaj kaj fakaj sekcioj. |
| IRIS (Internacia Reta Interfaka Simpozio) | Daŭrigi la organizadon de IRIS, jam suckese farite dum Retoso 2021 kaj 2023 |

## Eksteraj Rilatoj (KER)

**Priskribo:** La Komisiono pri Eksteraj RIlatoj (KER) respondecas pri la rilatoj inter TEJO kaj aliaj neesperantaj organizaĵoj. Ĝi celas rilati kaj kunlabori kun aliaj organizaĵoj ekster la Esperanto-movado por antaŭenigi niajn celojn kaj valorojn (rilate lingvopolitikon kaj eĉ pli), laŭ la vizio de la strategia plano 2021-25: "*Esperanton oni vaste kaj tutmonde konas kiel taŭgan solvon al la lingva problemo*."

**Respondecaj aktivuloj:** Abhinav (respondeca estrarano), David (eksterrilatisto)

**Antaŭviditaj rezultoj:**

| Planita agado | Komentoj |
|---|---|
| Varbado de novaj KER-aktivuloj: bonvenigo, trejnigo kaj aktivigo. | Novaj KER-anoj aldoniĝas al la komisiono tra la mandato, estas trejnitaj kaj kontribuas al la laboro, prenante generacian ŝanĝon. La novalvenantoj venas de diversaj kontinentoj kaj estas genre ekvilibraj. Novaj KER-aktivuloj estas senditaj al eventoj, reprezentas TEJO-n kaj kontribuas al la laboro de la Komisiono. |
| Reprezentado de TEJO dum la venontaj kunsidoj de la Konsilkonsilio pri Junularo (AC) de Konsilio de Eŭropo (KdE), kaj dum la kunsidoj retaj kaj fizikaj de FoJE, UN, CoNGO, UNOY kaj UNITED,  kaj kontribuado al la diskutoj. | La valoroj kaj planoj de nia organizo, montrataj en la Strategia Plano 2021-2025 de TEJO, estas reprezentataj per niaj aktivuloj ene de la diversaj supranaciaj organizoj pri kiuj ni havas rilatojn. Ni kreas la spacon por sendi el TEJO delegitojn kaj nomumi reprezentantojn en diversaj okazaĵoj de tiu ĉi organizoj. |
| Kunlabori kun la LS-oj de TEJO por la enigado kaj aktivado de ĝi en la Naciaj Konsilioj de la koncernaj landoj. | Nepras agi pri la valoroj kaj necesoj de la junulara esperantistaro ankaŭ el nacia vidpunkto, per niaj landaj sekcioj indas instigi kaj plifortigi la reprezentadon de la eksteraj rilatoj de la junulara esperantistaro per la naciaj konsilioj. |
| Partoprenigi KER-ecajn aktivaĵojn en esperantistaj spacoj, oferante programerojn kaj okazaĵojn dum Retoso, IJK, ktp. | Montrigi kaj informigi la junularan esperantistaron per okazaĵoj pri la aktivaĵoj, gravaĵoj kaj nepraĵoj kies komisionon faras por reprezenti kaj rilatigi eksteren niaj valoroj kaj planoj kun aliaj supranaciaj organizoj. |

## Informado (kaj Kontakto)

**Priskribo:** Informado tuŝas ĉiujn partojn de la agado de TEJO. Unuflanke ni volas uzi niajn kanalojn por varbi por nia agado - do se ni bezonas partoprenantojn por projekto aŭ ĉeestantoj por evento, forta informado gravas por plenumi tiujn celojn. Aliflanke, la enhavoj kiujn ni kreas en si mem estas la fina produkto, kiuj engaĝigas homojn kun TEJO kaj kontribuas al la Esperanta kulturo.

Ĝuste nun TEJO aktive reklamas sian agadon en kanaloj ĉe Instagram, Fejsbuko, Jutubo, Telegramo, Tvitero kaj LinkedIn, aldone al la propra retejo kaj retpoŝte (ĉefe per TEJO-Aktuale) al siaj membroj. Dank' al la laboro de nia oficisto pri merkatiko Jeanne (kaj nia eksoficisto Ariel antaŭ ŝi) TEJO havas fortegan kaj videblan eksteran identon ĉe tiuj kanaloj, kaj la prioritato ĉi-jare estas etendi tion - per aferoj kiel pli distraj enhavoj, pli da videoj, kaj produktoj kiuj eksplicite celas reklami Esperanton ĉe neesperantistoj.

**Respondecaj aktivuloj**: Tyron (respondeca estrarano), Jeanne (oficisto pri merkatiko), Karina (redaktoro de Kontakto), Ikvero (redaktoro de Movada Rubriko), Maria (TEJO-volontulo)

**Antaŭviditaj rezultoj:**

| Planita agado | Komentoj |
|---|---|
| Faru pli da "distraj" enhavoj en niaj sociaj kanaloj | Pro la sukceso de niaj aliaj agadoj, ni ofte devas reklami kaj varbi per niaj kanaloj. Tamen, ni ankaŭ volas certigi ke ne ĉiuj afiŝoj temas pri alvokoj, kaj estu ekvilibro inter tiuj kaj aliaj enhavoj. Dum la mandato, ni aktive strebos krei tiajn enhavojn (ekz. afiŝoj pri E-kulturo, aŭ la lingvo mem) |
| Pli da videoj | Videoj ege bone funckias por interesi homojn en TEJO kaj Esperanto, tamen lastatempe ni ne havis dediĉitan homon por krei tiujn. Ni strebos ŝanĝi tion |
| Fari enhavojn kiuj reklamas pri Esperanto | Ni ĝenerale kreas enhavojn por homoj kiuj jam engaĝiĝis kun ni, kaj faras relative malmulte por allogi homojn al Esperanto mem. Antaŭ la fino de la mandato ni ŝatus ŝanĝi tion - ekzemple per produktado de videoj en naciaj lingvoj (ne en Esperanto) pri Esperanto |
| Nova retejo por TEJO | Delonge nia retejo havis multajn problemojn, neaktualas, kaj ĝenerale ne taŭgas. Efektive oni atendis la lanĉon de AKSO por solvi tion, sed ne daŭripovas pli longe atendi. Ideale ni faros ĝin kadre de AKSO, sed ĉiukaze ni volas havi novan retejon de TEJO antaŭ la fino de la mandato |
| Revenigi Kontakton al la kutima aperritmo | Kontakto nun havas 9-monatan prokraston. La nova teamo urĝe laboras por solvi tion, kaj laŭ la nuna plano 2024:1 devus aperi en marto 2024, kaj ekde tiam ne plu estos prokrasto |

## Landa kaj Faka Agado (LFA)

**Priskribo:** La komisiono pri Landa kaj Faka Agado (LFA) okupiĝas pri la rilatoj de TEJO kun siaj landaj kaj fakaj sekcioj. Ĝi kunigas aktivulojn por ke ili povu regule interŝanĝi spertojn, ideojn kaj informojn pri siaj agadoj. Tiel ĉi tiu komisiono instigas ilin al konstruado de monda junulara reto, portante al TEJO la bezonojn de la organizoj kaj aktivuloj, strebante kontentigi ilin. Ĝi motivas junulojn (pli)agadi, agnoskante ilian gravajn laboron kaj sindonon, invitante ankaŭ la aliajn komisionojn kaj laborgrupojn de TEJO, la landajn kaj fakajn asociojn de UEA kaj aliaj organizojn por kunigi fortojn en projektoj celantaj la disvolviĝon de la esperantista junularo je la landaj kaj fakaj sferoj. Per la antaŭmenciitaj vojoj ĝi instigas kaj la kreadon de novaj landaj kaj fakaj sekcioj kaj la kreskigon kaj plifortigon de la jam ekzistantaj junularaj organizoj. Tiel TEJO ne nur efektivigas landnivele kaj faknivele siajn agadojn kaj prioritatojn, sed ankaŭ riĉigas la difinon de siaj celoj kaj planoj per tutmondaj, plurbranĉaj perspektivoj.

**Respondecaj aktivuloj:** Patricio (respondeca estrarano), Ada Florence (vicrespondeca estrarano), Snehaĝa (vicrespondeca estrarano), Arya Bhaskara Ferduzi (ĝenerala komisiito pri Landa kaj Faka Agado), Gobi Abyssinie (komisiito pri Landa Agado en Okcidenta Afriko), John Magessa kaj Aime-Patrick Manikariza (komisiitoj pri Landa Agado en Orienta Afriko), Igor Almeida (komisiito pri Landa Agado en Suda Ameriko), Olivro Fox-Rubin (komisiito pri Landa Agado en Norda Ameriko), Mateus de Sena (komisiito pri Landa Agado en Azio kaj Oceanio), Ĵaz (komisiito pri Landa Agado en Azio kaj Oceanio), Aŭŝrine Tamosiunaite, Lucca Catini Lanzi kaj Josuo Marso (komisionanoj).

**Antaŭviditaj rezultoj:**

- Aprobado de la Komitato de la kandidatiĝoj de tri novaj landaj sekcioj: Senegala Esperanto-Junularo (SEJ), Litova Esperanta Junulara Organizo (LEJO) kaj Aotearoa Ligo de Esperantistoj Junaj (ALEJ).
- Organizi Kontinentajn Junularajn Konferencojn kaj helpi en la organizado de aliaj regionaj eventoj kaj iniciatoj.
- Subteni pli grandan laboron en la landoj, kies rektan agadon ni ne havas tiom da presenco.

| Planita agado | Komentoj |
|---|---|
| Plirapidigo de la traktado de aliĝpetoj | Per dialogo inter spertaj kaj novaj aktivuloj ni sukcesos plirapidigi la traktadon de aliĝpetoj de organizoj kiuj emas iĝi landaj aŭ fakaj sekcioj de TEJO, pli efike subteni ilin en tiu procezo kaj instigi aliajn asociojn kandidatiĝi. |
| Kunlaboro kun la kurso por hispanlingvanoj | Per komuna laboro ni utiligos la kurson por hispanlingvanoj ĉeforganizata de Kolombia Esperanto-Ligo (kaj aliaj kiuj eventuale aperu estonte) por allogi junulojn al siaj landaj sekcioj kaj ankaŭ inviti ilin starigi novajn junularajn organizojn. |

| | |
|---|---|
| Remalfermo de Elstaraj Sekcioj | Per la konkurso Elstaraj Sekcioj kaj aliaj similaj ni proponos al junularaj organizoj realigi simplajn taskojn (disvastigi fotojn de siaj kunsidoj, organizi retajn eventojn kun aliaj sekcioj, disvastigi Esperanton en podkastoj pri lingvolernado, ktp.). Tia defio instigos sanan konkuradon kaj kunlaboremon. |
| Organizado de retaj eventoj | Per la helpo de aliaj komisionoj LFA helpos organizi Kontinentajn Junularajn Konferencojn tra la jaro. Krome, kadre de gravaj datoj por la esperantistaro, ĝi okazigos KIAL (Kunsido Internacia de Afrikaj Lingvoj) dum januaro, Lingvoj kaj Junuloj dum februaro en kunordigo kun Edukado, Scienco kaj kulturo. Ĝi ankaŭ riĉigos kaj tutmondigos la programon de Retoso kunlabore kun Retaj Kongresoj kaj helpos kadre de aliaj iniciatoj laŭbezone. |
| Finpretigo de KODEJO 2021 kaj 2022 kaj lancxo de KODEJO 2023 | Oni komunikos al la Komitato la rezultojn de la eldono de 2021 de KODEJO (Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organzoj), finkolektos kaj analizos la informon por la jaro 2022 kaj lanĉos la dokumentadon de la stato de la movado por la jaro 2023. |
| Akompanado de junularaj organizoj | Oni daŭre komunikiĝos kun junularaj organizoj kaj homoj kiuj povus starigi novajn sekciojn por oferi la subtenon de TEJO (speciale dum krizaj momentoj), informi ilin pri la rimedoj je ilia dispono kaj instigi ilin al pli forta engaĝiĝo je la iniciatoj de LFA kaj aliaj komisionoj de TEJO. |
| Plibonigo de projekta mastrumado de sekcioj | Esploro pri intereso de sekcioj de TEJO pri uzado de komuna altkvalita projekta mastrumilo. Okaze de sufiĉa intereso, ankaŭ provizo de la mastrumilo al la sekcioj, kaj eble al pli vasta Esperantujo. |